

AVENO #47 - Verdaj Partioj & Esperanto - 2021

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ghis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaghon al la sekretario de AVE: AVE@verduloj.org

Gravas scii kiom ni estas.

= = = =

2021-12-09 Verda Partio en Germanio parto de la registara koalicio

Post kelkaj semajnoj da intensa laboro la tri partioj (social-demokratoj, Verduloj kaj Liberaluloj) decidis la programon por la sekvaj kvar jaroj. Nun estas 5 ministroj kaj adicie la shtata ministerino pri kulturo kaj amasmedioj, Claudia Roth. Jen la ministroj:

Robert Habeck, ekonomio kaj klimato-protekto,

Annalena Baerbock, eksteraj rilatoj,

Cem Özdemir, nutrado kaj agrikulturo (inkluzivas fish-kulturo),

Anne Spiegel, familioj, maljunuloj, virinoj kaj junularo,

Steffi Lemke, ekologio, naturprotekto, nuklea sekurco, protekto de konsumantoj,

Ni esperas ke la registaro bone laboros; estas sufiche da grandaj problemoj - kaj pluraj normalaj.

- -

2021-12 Rusio montras sian armeon antau la limo de Ukrainio

Bone ke Putin kaj Biden interparolis. Bedaurinde mankis interkonsento.

Plej grave estus ke OSKE organizus konstantajn kunvenojn. OSKE diskutas la temojn sed nuntempe mankas konsento de la potenculoj, ke OSKE kontribuu lau ilia chefa celo - lau eo.wikipedia.org > OSKE:

La ĉefa celo de la organizaĵo estas solvo de eblaj konfliktoj, preventado de ili, mildigo de jam ekzistantaj konfliktoj.

Ilia retejo - OSCE.org - montras regule kio okazis en la limregiono, kaj skribis je 7a de Decembro ke ilia grupo (SMM) ne estis allasita al la alia flanko de la limo de okcidenta Ukrainio al la regiono Luhansk - kaj protestis pri tio.

= =

2021-10-18 Dankon al Yannick Jadot de la francaj Verduloj

en lia programo por la baloto de nova prezidento de Francio, Jadot enmetis bonan alineon pri lingva politiko. Ne nur subteni la regionajn kaj minoritatajn lingvojn, sed ankau ke li povas imagi ke ghi estos estos instruata en chiuj niveloj de lernejoj.

<https://www.eelv.fr/files/2021/07/Projet-EELV-2022-11.07.21-1.pdf>

Assurer la diversité linguistique et culturelle en France

Nous ratifierons la charte européenne des langues régionales ou minoritaires. Nous reviendrons sur le plan langues du ministre de l'Éducation nationale pour donner les moyens à l'éducation de jouer un rôle central dans leur transmission. Cela passera par la possibilité de suivre un enseignement bilingue de la maternelle au lycée dans tous les bassins de vie concernés. Et par le soutien à l'enseignement immersif en langue régionale dans l'enseignement public et dans l'enseignement associatif, notamment.

L'espéranto, langue auxiliaire internationale, est appris et parlé dans plus de 120 pays dans le monde. C'est une langue facile et rapide à apprendre, à la portée de tous. Nous rendrons possible son apprentissage dans l'enseignement primaire, secondaire et supérieur.

= =

2021-09-29 Gratulon al la Verda partio „Bündnis 90 / Die Grünen) en Germanio

unue mi gratulas "mian" Verdajn Partiojn, kiu ricevis 118 seghoj de entute 735, kaj sekve de tio konfirmon ke la plej gravaj temoj gravas por multaj homoj:

- protekti la klimaton kaj biodiversecon; altigi la minimuman salajron al 12 Euro hore; ni celas atingi bazan asekuron kaj pensio-kason por chiuj, inkluzive de shtataj oficistoj kaj parlamentanoj (simile al Svisio, Austrio, Svedio); altigi la impostojn por homoj kun tre alta salajro au tre granda richeco, por

redukti la grandan diferencon inter sen-richuloj kaj tre/tro-richuloj ankau post la laborista vivo. La Verduloj kreis koalicion kun SPD kaj Liberaluloj.

= =

2021-09-21 pri Verdaj Partioj kaj Esperanto

Ni gratulas al la Verda Partio de Kanado, kiu lau nuna nombrado (372.369 vochoj) denove ricevos 2 seghojn en la parlamento - el entute 337. Bedaurinde la plimulteca sistemo preferas la grandajn partiojn.

Andreas Langholf petis diskonigi ankau la fundamentan kritikon (programajn tezojn) de OeDP (Ekologia Demokrata Partio) en Germanio. Tiu estas - mi diru - pli fundamentisma ol la Verda Partio. En kelkaj urboj de Germanio ili estas en urbaj konsilioj. Unu kandidato estas en la Europa Parlamento; antaue estis profesoro Klaus Buchner, kaj nun Manuela Ripa - shi kunlaboras en la frakcio Verduloj & Regionalistoj. La retejo: <https://www.oedp.de/startseite>

Iam OeDP havis sian programon en Esperanto sur la retejo, sed mi ne plu trovis ghin. Dankon al Andreas kiu publikigis ghin en Sennaciulo - vidu ghin alkrochite.

Sur la retejo de la Europaj Verdaj Partioj vi trovas ligilon al iliaj komunaj gvidlinioj en Esperanto:

<https://europeangreens.eu/node/5745>

Simile la Charton de la Tutmondaj Verdaj Partioj (versio de 2012) - la sekva kongreso okazos nur en Junio 2023 - tiam ni tradukos la novan version:

<https://globalgreens.org/wp-content/uploads/2021/04/Esperanto-Charter.pdf>

Mi ghojas ke Esperanto estas en retejoj de kelkaj Verdaj Partioj kaj iliaj asocioj. Sur la retejo de la franca verda partio EELV, vi trovas ech detalan klarigon kio estas Esperanto - kaj kial uzi ghin. Tie vi ankau trovas dokumenton de UEA en Esperanto: <https://esperanto.eelv.fr/aliaj-informoj/>

= =

2021-05-17 Verduloj en Anglujo kaj Kimrujo estas bone akceptataj

Jen du novajhoj kiuj tre rilatas unu la alian.

Kaj mi estas scivolema kion pensas la diversaj partioj en GB pri komuna estonteco ?

<https://verdularo.com/2021/05/17/verda-partio-de-anglujo-kaj-kimrujo-festas-rekordajn-rezultojn/>

2021-05-11 Gratulon al la Verduloj en Skotlando, ili ricevis 8 seghojn en la parlamento.

Ni estas scivolemaj kiel la skotoj vochdonos pri la „exit“ el Granda Britio.

= =

2021-04 EELV denove subtenas Esperanton

POUR UNE DIVERSITÉ CULTURELLE, ARTISTIQUE ET LINGUISTIQUE

Prendre en compte la diversité des pratiques culturelles et artistiques de tous nos territoires notamment par un soutien de la connaissance, la diffusion et l'enseignement des langues régionales, locales et de l'espéranto, langue internationale neutre et équitable.

<https://www.eelv.fr/files/2020/10/EELV-Plateforme-Regios-Depts-2021-V2-1.pdf>

--

2021-04-11 Verduloj n Chilio subtenis la referendumon por nova nacia statuto

Morgau okazos la naciaj, regionaj kaj urbaj elektoj en Chilio, kaj Partido Ecologista Verde partoprenos kun entute 411 ge-kandidatoj. Ni esperas verda sukceson por Chilio.

Mi ricevis raporton de amiko kiu vivis kaj laboris (antaŭ ch. 40 jaroj) dum pli ol unu jaro en tiu longega lando, kaj raportis. Shokis min ekzemple la neglekto de praarbaroj, ankau tie. Jen informo:

https://globalgreens.org/news_statement/after-the-protests-chileans-are-re-writing-their-constitution/

--

2021-04 Gratulon al Verda Partio Zelenite en Bulgario

Enkadre de la naciaj balotoj Zelenite kunlaboris kiel Verda Movado en la grupo „Demokratio Bulgario“. Tiu grupo batalas delonge por pli bona demokratio kaj kontraŭ korupcio. Kompreneble la Verda Partio krome kunportas la ekologiajn kaj sociajn temojn. La grupo ricevis 9,3% (27 mandatoj) kaj sekve de tio 4 kandidatoj de la Verduloj eniros la bulgaran parlamenton: Albena Simenova (Dobrich), kaj 3 el Sofio: Borislav Sandov, Vladislav Panev kaj Ivan Velov.

(koran dankon al Mariana :) jen la retejo: <https://www.zelenite.bg/istoricheski-uspeh/>)

--

2021-03 Gratulon al Verduloj en Germanio

En la federaciaj landoj Baden-Virtembergo ili ricevis la plejmulton de la voĉoj (32,6%) kaj la nuna ministroprezidento (chefministro) Winfried Kretschmann decidis koalicii denove kun CDU (kristana demokratia partio)

<https://www.tagesschau.de/multimedia/video/video-836803.html>

kaj en Rejnland-Palatinato la Verduloj 9,3% ili koalicias denove kun SPD 35,7% kaj la Liberaluloj.

<https://www.tagesschau.de/multimedia/video/video-836807.html>

= =

2021-03-18/19 granda virtuala konferenco pri Verda Interkonsento (Green Deal) de EU

En tiu konferenco enkonduke parolas ministroj, kaj je la 18a okazos pluraj laborgrupoj pri tiuj multaj interplektitaj temoj (klimato, daurigeblo, merkato, biodiverseco). La lingvoj estos la angla, franca kaj germana. Jen la retejo - Jen informoj en la angla kaj germana.

<https://gruene-europa.de/de/artikel/event/european-green-deal-den-aufbruch-gestalten-setting-the-course/>

= =

2021-02-28 Pri Verdaj Partioj - tutmonde

Chilio - granda voĉdono por krei novan konstitucion (la nuna estis de Pinochet ...).

Lau vic-prezidantino de la Verda Partio de Chilio (Partido Ecologista Verde) Sofía Catalina Durán Escobar je la 11-a de Aprilo oni elektos landan asembleon de civitanoj kiuj verkos la novan konstitucion; kaj ankaŭ novajn municipajn konsiliojn - la verda partio partoprenas per 500 kandidatoj. Shi plendis ke la registaro subpremigus la manifestaciojn - la lasta okazis pro altigo de trafik-biletaj prezoj. 2.500 estis vunditaj, inter ili 400 perdis unu okulon pro gumaj kugloj. Kelkaj mortis aŭ estis delokigitaj (perdigis).

En Ruanda nun estas 3 verdulaj parlamentanoj: Alexis Mughisha estas la tria - por la Senato - li estas bakalaureato (bachelor) pri fizika kaj homa geografio, kaj aktivis al diplomo (master) pri medio kaj evoluo.

Nov-Zelando - Aotareo

la Verdula partio (Greens Party) nun estas la tria en la lando - ili ricevis 7,9%.

je municipaj elektoj la Verduloj ricevis 46 urbestroj, 67 vic-urbestroj kaj 801 konsilistoj.

Ili aktivis por sociala kaj natur-media justeco. (kion la Brazila prezidento tute malshatas)

Usono - gp.org

Howie Hawkins (US Green Party) ricevis 342,282 voĉoj okaze de la prezidento-elekto.

Krome 11 membroj de GPUS estis elektitaj por municipaj postenoj, inter ili Emmanuel Estrada (26-jaragha) kiel urbestro de Baldwin Park, Kalifornio.

Australio

Queensland - 2 kandidatoj gajnis seĝojn por Maiwar (Michael Berkman) and South Brisbane (Amy MacMahon) ili promesis plibonigi la publikan transporton kaj komunuman posedon de medio-afabla energio-provizado.

Capital Territory (ACT)

Ili gajnis kvar seĝojn (nun estas 6) kaj kune kun ALP (liberaluloj) formas la registaron de ACT.

= =

2021 / 2020-11-30 David Healey ighis urbestro en Dublin-Fingal

David Healey, esperantisto kaj membro de la Verda Partio, de duonjaro estas urbestro de Fingal, unu el la kvar municipoj kiuj konsistigas Dublinon. Li diras al **Libera Folio**, ke li bonvenigas sugestojn pri tio, kiel li povus helpi al la movado. Gratulon !